# La Pacdefendanto

N-o.13. NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ČEHOSLOVAKIO Januaro 1953

## LA REDAKTORO AL LA LEGANTOJ

Karaj gekamaradoj, la situacio devigis min unuafoje en mia vivo okupi tiun či postenon. Mi estas de 1921 esperantisto kaj samtempe mi farigis membro de la Čehoslovaka komunista partio. Mi estas unu el giaj fondintoj. Pro tio mi devis pasigi 6 jarojn en fašista koncentrejo/de 1939-1945/. Mi vivis en Dachaů, Buchenwald, Natzweiler k. Schlackenwerth. Tie mi multe suferis kaj ankaů multe lernis. Čiutage mi rigardis la morton en vizagon. Mi abomenas la militon kun čiuj siaj kruelaj akompanajoj. En mia konscio maturigis la ideo, ke Esperanto povas esti tre grava armilo per kiu eblus elbatali sur internacia bazo daůran mondpacon. Neniu gis nun sukcesis konvinki min, ke mi eraras, pro tio mi restas sur mia vojo kaj daůrigas la batalon kun via afabla helpo. Mi multe dankas al vi por čiuj bondeziroj, kiujn vi sendis al mi okaze de la novjar-komenco kaj mi firme kredas, ke kun via kamarada kunlaboro la deziroj de ni čiuj efektivigos. Certe unu batalanto signifas nenion se li restas sola, sed se ni čiuj firme kunligigos, se ni čiuj pacamantaj kaj progresemaj esperantistoj unuigos kaj senhezite kunlaboros, ni povas atingi tre multon. En tiu senco memkompreneble ankaů unuopulo signifas tre multe, se li firme staras sur sia loko kaj se li guste tenas la direktilon en siaj manoj. Dum mia unujara funkcio mi interkonatigis kun multaj kuragaj, kapablaj kaj progresemaj esperantistoj en nia lando. Estas kamaradoj, kiuj malgraů diversaj malfacilajoj ne ektimigis kaj male ankoraů pli eklaboris por nia afero. En tiuj mi vidas verajn apostolojn de nia kara majstro. Tamen ne eblas sin kredigi, ke tiuj bravuloj mem elbatalu por la homaro plibonan vivon kaj fratecon, se ne ni čiuj, kiuj ni staras čirkaů de ili farigos samfortaj kunbatalantoj. Mi scias ke multaj el vi, okaze de la likvido de la Esp.-centro en Praha, opiniis jam čion perdita. Estis kvazaů trančilo tušinta nian kolon. Kaj vidu! Hodiaů vi devas konstati, ke vi tamen eraris.

La situacio ankoraů ne estas tiom venkita, ke ni ekdormu en gloro, sed per nia unueco ni tamen multon gajnis kaj sukcesis defendi la minimumon, nian daůran ekziston. Jen ekzemplo, kion signifas unueco kaj persisto. Ni ne lasu nin fortimigi de nia gusta vojo! Nia celo estas klara kaj senkompromisa. Ni batalas per Esperanto por la interfratigo de la nacioj kaj por la tut-monda paco. Ni batalas per Esperanto por la unuigo de proletoj el čiuj landoj, kontraů la ekspluatantoj kaj kapitalistoj, kontraů iliaj servistoj, la militprovokantoj, fašismo kaj bakterisemantoj. Nia batalo estas la plejprava kaj neniu el ni bezonas honti, se stultulo aů krimulo provas nin moki aů fine malhelpi en nia honesta klopodo. Bedaůrinde, ne čiuj honestaj ko-

moj nin ankoraŭ komprenas, ja eĉ ne ĉiuj esperantistoj. Sed ju pli klre ni montros kaj ekbatalos por nia fina celo, des pli da honestaj homoj kolektiĝos en niaj vicoj. Ni ne faru grandan bruon por Esperanto, sed ni laboru per ĝi por ĝi, trankvile, silente kaj celkonscie! Jen la perspektivo, laŭ kiu ni direktu nian agadon en la nova jaro. Jarfine ni resumos ankoraŭ pli grandajn sukcesojn --------- Rud. Burda

LETERO EL DEMOKRATA G E R M A N I O

Atingis min letero de k-do Lunga Miroslav, al kiu mi sendis parton da korespondanonĉoj por publikigi en LA PACDEFENDANTO.

Unue mi deziras al vi kaj ĉiuj gesamideanoj en via regiono sanon feliĉon kaj multan sukceson dum via laboro en la nova 1953a jaro. Tre volonte mi klarigas al vi la situacion pri nia verda lingvo ĉi tie.

Vi certe bone scias, ke la hitlera registaro en 1936 tute malpermesis nian lingvon kaj pro tio la eldonejo de HEROLDO devis translogiĝi al Nederlando. Post la 45. en ĉiuj regionoj komencis la plej diligentaj samideanoj denove klarigi la ideon de nia granda majstro d-ro. Zamenhof. Estas vere bedaŭrinda afero, ke ni ankoraŭ ne ricevis la permeson por publika laboro.

Nia laboro estas tute privata kaj grupoj absolute ne ekzistas. Unu helpas la alian. La junaj kamaradoj ofte nur studas mem per helpo de malnovaj lernolibroj kaj per la korespondado kun eksterlandanoj, kiuj helpas al ni.

La kaŭzoj pro kiuj venas gejunul -oj al ni verdstelanoj estas diversaj/p.k. il., p.m. kolekto ktp./ Ofte ili komencas post la unua kontakto aŭ informo pri nia lingvo

La ĉefa afero estas, ke ekzistas kontentiga intereso. Mi mem estas nun 25-jarulo kaj ekkonis nian lingvon unuafoje antaŭ ĉirkaŭ du jaroj. Tre bedaŭrinda estas, ke ankaŭ kunvenoj ne estas eblaj por interkonatiĝi kun la diversaj al ni ne konataj gesamideanoj, kiuj ankoraŭ restas kaj kunlaboras.

Malgraŭ ĉiuj malhelpaĵoj ni esperu, ke venos la tago, kiam denove ni ricevos la rajton organiziĝi, por povi pli bone servi al la idealo de la interpopola paco kaj amikeco.

Willi Bre*schneider

Rim. de la red.: Sub la rubriko korespondi deziras vi trovas adresojn de germ. gek-doj al kiuj ni rekomendas skribi multnombre.

ONI KULTURAS PESTON KAJ ĤOLERON

La japana ĵurnalo KOKUSAI malkovris esplorejon de malgrandaj animaloj en Kasugabe, Saitama gubernio, ke ĝi estas suspektinda provizejo de musoj al Koreio, ĉar la instituto kulturas daŭre milionojn da musoj kaj marmotoj, kaj ne nur liveris al la fama Iŝii taĝmento, sed ankaŭ kaj ankoraŭ liveradas preskaŭ ĉiujn kulturitajn animalojn nun al usonaj garnizonoj. Plie tie laboras unu japana spertulo /fakulo/, kiu antaŭe apartenis al la malbonfama „bakteriologia taĉmento.

• El revuo EL JAPANIO

LA KULTURPORTANTOJ FURIOZAS

Kie estas usona garnizono, tie okazas seksperfortoj al japanaj virinoj. Sed tio, kio okazis la 9. de okt. en Ŝinagaŭa, Tokio, ke knabineto Minjo grave estis vundita, ja tremegis pro besteco kaj fajre ekscitis la mondon. La viktimo estas malpli ol 4jara infaneto. Ŝi iris por vidi la patron, kiu ankoraŭ ne revenis hejmen, kaj estis survoje per ortita de usona soldato. Kiam oni dorsportis ŝin, kiu estis large vundita kaj sangmakulita, gepatroj de knabinoj el la najbareco svarmis kolerigitaj al la fronto de la garnizono, sed armitaj soldatoj forpuŝis ilin al jap. policio, kiu tamen tute ne kuraĝis fari ion por la demonstrantoj. Ŝia patrino, Kaneko-Tomi/30j./ diras, "Supozeble estas, ke da samaj viktimoj estas tre multnombraj, sed ĉiu patrinoj de la viktimoj pro hontemo ne volas malkovri la veron, kaj la rakontoj ĉiam nebuliĝas en forgesemon. Mi tamen decidis publiki por preventi similajn malfeliĉ-

ajn okazojn.
Ĉ?ere en la sama vespero en la sama distrikto tri aliaj virinoj ankaŭ estis atakitaj de usonaj soldatoj, sed,ĉar la policio ne volas efektive agi,oni formis asocion por gardi virinojn kaj sendis proteston al la koncernantaj aŭtoritatuloj.

El revuo„EL JAPANIO"

---

AL LA ABONANTOJ DE „EL POPOLA ĈINIO"

---

Ĵus la ĉina administracio sciigas al ni,ke la kalendaro por 1953 kaŭze de trookupiteco en la presejo iomete malfruigas kaj estos al vi sendota gis kun la februara numero.

La gek-doj.,kiuj varbis pli ol 10 novabonantojn,ricevos jam en proksima tempo la bele ilustritan libron pri Popola Ĉinio,sed ne eblas tiun ĉi libron aĉeti,ĉar gi eldonigos nur en malmultaj ekzempleroj.

La decembra n-o.de EPĈ.atingos vin iom malfrue,ĉar ORBIS rifuzis tiun ĉi n-on.distribui kun la preteksto, ke gi apartenas ankoraŭ al la laboro de la malnova peranto.Tio kaŭzis komplikajon en la ekspedo kaj malfruigon.Ni petas vian pardonon.

De la januara n-o.jam ĉiuj abonantoj,pagintaj la restpagon gis fino de 1953.al la peranto,ricevos regule la gaz.de ORBIS.Ti-kiuj ankoraŭ ne pagis la elkalkulitan reston,rapidu gin sendi,aŭ almenaŭ anoncu al la peranto,ke vi ne intencas reaboni.

NI BEDAŬRAS

ke pli ol 100 gek-doj ne sciis,ke por sendi presajon sufiĉas afranki per 1.-Kĉs p.m.kaj sendis la abonmonon por EPĈ. en fermita letero afrankitan per 3.-Kĉs p.m. Per tiu ĉi pliafranko /2.-Kĉs/ni preskaŭ estus povintaj eldoni 1 pagon pli al nia cirkulero. Do gek-doj,estonte estu pli atentaj kaj prefere donacu tiun monon al nia administracio.

---

BELEGAJ ĈINAJ AFIŜOJ PRI LA packonferenco en Peking kun la rezolucio kaj dankletero kaj aldona ĉeĥlingva traduko tre trafa por ekspozicii,estas riceveblaj en 4 ekzempleroj por 20.-Kĉs,inklusive la poŝtfranko ĉe nia redakcio./1.peco 5.-/

EL LA MONDO

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

JAPANIO,Ĉuĉii-Bansui,fama poeto k. verkinto de„La luno super la kastelruinoj"mortis la 19.de novembro en Sendai/malliberejo/Lia jam mortinta filo estis esperantisto.

La nova kontraŭ TBa medikamento Hidrazido de Isonikotina Acido efikas kontraŭ lepro.Tion oni konstatis en kunsido de la oficistoj el lepro-sanatorioj,okazinta en Kioto la 20.de oktobro 1952.

Sub la titolo„EL JAPANIO"aperis nova ciklostilita bulteno,kies redakcio promesas gian eliron dufoje dum monato.La unua n-o.aperis la 25.de okt.1952 kun 6 pagoj,raportante ĉefe pri la batalo de la jap. popolo por sia liberigo kaj por la paco.Eldonas:Esperanto-Tusinsya, P.O.Boxa 5,TOYONAKA,Japanio.

FRANCIO ,mortis malnova Esperanto-pioniro,k-do.Glodeau/Glodo/el Parizo.Glodeau estis unu el la fondintoj de la franca laborista Esperanto-movado,fondinto de la revolucia,internacia Esp.-organizo„Liberiga stelo",kies fondigo okazis en la kadro de la UEA-kongreso en la jaro 1921 en Praha,Ĉehosl. Kiam „Liberiga stelo" transformigis en Sennaciecan Asocion Tutmondan,k-do Glodeau farigis unu el la plejaktivaj propagandistoj de sennaciismo. SAT perdis en k-do.Glodeaŭ ne anstataŭigeblan funkciulon kaj la progresema esp-istaro ne kompromisan batalanton kontraŭ ĉiu ajn naciismo kaj por la tutmonda paco.

GVATEMALO, la ministerio por publika instruado eldonis dulingvan,hispan-esperantan prospekton kaj katalogon ilustritan pri ekspozicio de pentrajoj de desegnoj de infanoj el la tuta mondo okazinta en Pasaje del Palacio National.La katalogo enhavas 260 verkojn akompanataj de la nomo kaj ago de la desegnintaj infanoj el 22 landoj.

FRANCIO,la Esp.-movado vigle progresas malgraŭ la malfavora ekonomia situacio.Kursoj por komencantoj funkcias en BLOIS kun 10 lernantoj,en CAUDRY kun 20,en EVREUX/Normandio/ publika kurso,en Villeurbanne kun 4 en NANCI kun 15 kaj koresponda kurso kun 45 kaj en SAINTES kun 40 l-oj

# Nia movado en Ĉeĥoslov.

BUDČA, distr. Zvolen, Slovakio, la E-movado en tiu malgranda vilago daŭre vivas. Okazas kurso por komencantoj kun 8 personoj. La rondeto mendis por 4 plej aktivaj membroj la gaz. EL POPOLA ĈINIO kaj promesas varbi ankoraŭ pluraj abonantojn.

ORLOVÁ II,

En oktobro 1952 mortis unu el niaj aktivaj kamaradoj, k-do. KAJFOŠ Pavel, loĝinta en Orlová II, č.292, Slezsko, Ĉeĥosl. Ni promesas daŭrigi lian vojon kaj al liaj familianoj ni esprimas nian sinceran elkoran kondolencon.

OSTRAVA ZÁBŘEH, fondiĝis la 3. de decembro nova uzina Esperanto-klubo por ĉiuj fabrikejoj de la granda feruzino de Kl. Gottwald en Ostrava-Vitkovice. Fondintaj membroj estas 18 kun k-do. Fr. Lička. Tuj la 10.12. komencis kurso kun 30 lernantoj. La sindikata uzina klubo donis al ni senpage agrable hejtitan kunvenejon kaj ni esperas, pliposte ricevi ankaŭ financan subtenon el la kaso de la sindikata uzina klubo. En Februaro aŭ marto ni intencas arangi komunan laborkunvenon por la regionoj de Ostrava, Gottwaldov kaj Olomouc en Ostrava-Vitkovice. La uzina gazeto JISKRA /fajrero/ afable publikas niajn varbartikolojn.

TANVALD, en nia loka Esper-movado nenio ŝanĝiĝis. Antaŭe ni kunvenadis ĉiu semajne, nun, sekve de diversaj laborterminoj ni kunvenas de tempo al tempo laŭ interkonsento. Nia rondeto estas negranda, sed laborema. Ni konstante korespondas, interŝanĝas librojn kaj gazetojn kaj kontaktas nur kun klaskorsciaj, diversnaciaj gek-doj. Jam antaŭ 1 jaro ni farigis rondeto de nia Urba kleriga klubo - /Osv. Bes./ Nia propaganda kesto, pendigita surmure de la hotelo CENTRÁL ĉe la stacidomo pro regula ŝanĝo de ekspoziciajoj akiris jam bonan popularecon ĉe niaj samurbanoj.

BRNO, la rondeto de BZKG ĉe la uzina kultura klubo de ROH/sindik/ arangas la 15. de januaro kurson al kiu jam aliĝis 8 lernantoj. La rondeto, kiu konsistas el 28 membroj kunvenadas ĉiu merkrede en BRNO 18 Životského 5 vespere. En februaro ni arangos en la Kultura Dono de la 1. maŝinfabrikejo en Brno ekspozicion pri Popola Ĉinio.

OPAVA, En landa kunveno de nia junu-laro okazinta la 27. de okt. en Ostrava, la delegitoj decidis unuigi la tutlandan esp-junularon kaj eldoni por ĝi unu solan esp-lingvan centran, ciklostilitan cirkuleron dum la monato. La delegitoj konstatis, ke ne eblas plu pro diversaj malfacilaĵoj eldonadi kelkajn cirkulerojn en diversaj regionoj. La centra cirkulero nomiĝos „TAGIĜO", ĝin eldonados la junularo en Opava kaj redaktos k-do. Vlad. NOVOBILSKÝ, Tyršova č.35, Opava. Ĝin eblas aboni kontraŭ sendo de 100-200 ciklostil-paperoj. La Esp-junularo sendu raportojn al la supra adreso.

Ekspozicio pri Tutmonda klasbatalo estis vizitita de proks. 500 personoj kaj atingis bonan financan kaj moralan sukceson. K-dino. Kuzníková Bl. sukcesis varbi 13 abonantojn por EPĈ. kaj esperable ili fariĝos ankaŭ abonantoj de LA PACDEFENDANTO.

HRADEC u Opavy, k-do. M. Paruza sukcesis varbi 6 abonantojn por EPĈ.

ZVOLEN-Slovakio, k-do. Ján Dovčík varbis 4 abonantojn por EPĈ.

SKALICE, okr. Nový Bor, k-do. R. Wenzel varbis 2 abonantojn por EPĈ.

KARL. VARY, k-do. F. Tichota varbis 2 abonantojn por EPĈ.

PARDUBICE, k-do. Franc varbis 3 abonantojn por EPĈ.

ČESKÉ BUDĚJOVICE, responde la rimarkigon pri nia laboro en la 12.n-o. de „L.P." ni klarigas la situacion en nia urbo:

Dum ekzistado de nia klubo „LA PROGRESO" ek de la jaro 1920 ni ĉiam gvidis sufiĉe fortan kurzon kaj nia membraro daŭre kreskis ĝis la germanfaŝista okupacio. Tuj post fino de la okupacio ni denove kun entusiasmo ekkomencis labori kaj niaj kursoj estis vizitataj grandparte de laboristoj kaj studentoj. Disva-

stiĝis la korespondado kun eksterlando kaj la akiritaj materialoj estis ekspoziciitaj en montrokestoj. Ni varbis novajn interesulojn, sed preskaŭ antaŭ de du jaroj la korespondado de niaj anoj fariĝis malsukcesa. Ili ne ricevas respondon, ankaŭ ne de longjaraj korespondantoj, sed ne nur el landoj okcidentaj, sed lastatempe ankaŭ ne el Polio, Bulgario ktp. Tio malhelpas al nia movado kaj la kursoj fariĝis de tempo al tempo čiam pli malfortaj. Precipe la junularo jam ne montras intereson - kaj la deziro de la partio, ke ni plu ne faru propagandon kaj ne arangu kursojn, estis la komenco de la fino. -La gvidanto dé la junularo rezignis kaj malmultaj gejunuloj el la lasta tempo, kiuj ankoraŭ vizitadis niajn kunvenojn nun forrestas. Kunvenas nur kelkaj malnovaj kaj maljunaj gesamideanoj. Nia membraro estis forta kaj vivpotenca. Ni gis nun eldonis 544 membrokartojn, sed nun kunvenadas nur 10-15 personoj, tiel aspektas nia situacio. -

Čar ni pagas nur 20.-Kčs membrokotizon jare, mankas al ni ankaŭ la financaj rimedoj. El tiu kaŭzo ni neplu povas abonpagi la gazeton EL POPOLA ČINIO, sed abonas nur LA PACDEFENDANTOn. Kvankam nia situacio malgojigas čiujn, ni persiste laboras plue, esperante, ke nia pacama ideo finfine venkos.

Eventualajn konsilojn aŭ helpon direktu al: ESPERANTO-SERVO, Šumavská č.250, ČESKÉ BUDĚJOVICE, Čehoslov.

MOST, la 29.de decembro 1952 ni arangis kunvenon por rekapituli nian agadon el la pasinta jaro. Viglan diskuton partoprenis 11 gek-doj. La 6.de januaro komencigis kurso kun 12 lernantoj en Kultura Domo de la Štalfabrikejo „1.majo" en Most. Anoj de la klubo kunvenas regule marde kaj jaŭde de la 19.h. en Kult.Domo.

PLZEŇ, la 12.1.komencigis nova kurso por komencantoj kun 8 lernantoj Instruas k-do.Lad.Proskovec. La 23. de jan.komencos plua kurso kun 9 lernantoj. Instruas k-do.Rud.Burda. Por infanoj okazas regulaj konversacioj čiu vendrede de 17.h. en la klubejo. Membra kunveno okazos la 28.de januaro en la klubejo, Solní 17. Niaj infanoj skribis 32 let-ojn. al eksterlandaj infanoj.

OLOMOUC, la 3-4.de januaro okazis laborkonferenco de esp-istoj en la regiono de Olomouc. Partoprenis 97 gek-doj. La interkonatigan vesperon čeestis 110 gek-doj. 2/3 konsistis el junularo.

PRAHA, la junularo arangas kurson por 4 geblindulo j en la instituto de KLAR. En la ekspozicia fenestro de Wilson-stacidomo ĝi prezentas al la publiko kolekton da fotoj pri la packonferenco de aziaj kaj pacifikaj regionoj, okazinta en Peking kaj pri la nacia festo okaze de la 3.datreveno de fondigo de la Čina popola respubliko, ricevitan de la Čina Esperanto Ligo el Peking. Pri tio ricevis nia redakcio de k-do. Vyhlídka el Praha foton.

---

VALORO DE EKSTERLANDAJ PAGILOJ
laŭ publikigo de čehosl ministro por financoj

| | | | |
|---|---|---|---|
| Argentinio | 100 | pesoj ...... | 355.Kčs |
| Aŭstrio | 100 | šilingoj... | 192.-" |
| Belgio | 100 | frankoj.... | 100.-" |
| Brasilio | 100 | cruceiroj.. | 272.-" |
| Bulgario | 100 | levoj...... | 735.-" |
| Danio | 100 | kronoj..... | 723.-" |
| Egiptio | 1 | funto...... | 144.-" |
| Finlando | 100 | markoj..... | 21.-" |
| Francio | 100 | frankoj.... | 14.-" |
| Nederlando | 100 | guldenoj... | 1315.-" |
| Italio | 100 | liroj...... | 8.-" |
| Islandio | 100 | kronoj..... | 306.-" |
| Kanadio | 1 | dolaro..... | 52.-" |
| Polio | 100 | zlotoj..... | 1250.-" |
| Hungario | 100 | forintoj... | 426.-" |
| Norvegio | 100 | kronoj..... | 700.-" |
| Portugalio | 100 | escudoj.... | 175.-" |
| Romanio | 100 | lejoj...... | 446.-" |
| USA | 1 | dolaro..... | 50.-" |
| Sovjet Unio | 1 | rublo...... | 12.-" |
| Svedio | 100 | kronoj .... | 966.-" |
| Svisio | 100 | frankoj.... | 1170.-" |
| Turkio | 100 | funtoj..... | 1785.-" |
| Gr.Britio | 1 | funto da sterlingoj | 140.-" |

## KLARIGO

Kun la decembra n-o. ni sendis al čiu abonanto sciigon, kiom li šuldas ankoraŭ ĝis jarfino por la gazeto EL POPOLA ČINIO laŭ la nova, de ORBIS decidita prezo /90.-Kčs/. Certe ne estas enkalkulita la jarabono por LA PACDEFENDANTO, t.e. 30.-Kčs. Tiun sumon vi povas laŭ okaze sendi en ordinara letero al k-do.Rud. Burda, PLZEŇ, Palackého nám. č.6.

## KION VI POVAS AĈETI ĈE NI

Libroj kaj broŝuroj:
Ing.L.Krajíc:Esperanta lernolibro kun aldonoj.............30.-Kčs
Hromada Rud.:Ĉeĥo-esperanta vortaro .........................12.- "
Filip J.a K.:Kantareto kun 5 propag.glumarkoj...............50.- "
Majerová M.: Urbo sub signo de fajro ........................30.- "
Collingen: Esperanto kaj ĝiaj kritikantoj ................ 2.- "
Dro.St.Kamarýt k.d-ro.T.Pumpr : Esperanto-ekzamenoj.......10.-""
Bouŝka H.K.: 1.kaj 2.informfolio pri E.kun prop.glum...... 2.- "
Ĉina broŝ.:Por nova afero,nova maniero ......................20.- "
" " La plejforta voĉo de la paco/poemoj/............10.- "
Propagandiloj:
Insigno:verda stelo sur blanka emajlo/rond.13mm/.........12.- "
ESPERANTO-INFORMO /emajligita tabulo/.....................100.- "
Kartona afiŝo kun surskribo„ESPERANTO"................. 5.- "
Granda propaganda afiŝo por kursoj..................... 2.- "
Malgranda " " " " ...................... 1.- "
Luksa fotaĵo de la partoprenintoj de E-kongreso en Koŝice100.- "
Foto de la kongresanoj en Liberec kun glumarko........... 40.- "
10 Esp.leteroj kun papero kun 21 glumarkoj.............. 15.- "
10 " " " " aerpoŝtaj kun 21 glumarkoj....... 20.- "
Poŝtkarto de ĉeĥoslov.landkarto........................ 2.- "
" kun kanto„NUR ANTAŬEN" ........................ 1.- "
" -foto de Esperanto-monumento en Ostrava ........... 3.- "
" " de d-ro.L.L.Zamenhof ........................... 1.- "
" de SÁT belkoloraj ................................ 1.- "

Ĉi supre cititan materialon eblas mendi ĉe:Osvět.beseda v Plzni-Kroužek esperantistů,poštovní schránka 232,P L Z E Ň,Ĉeĥoslovakio
Al pligrandaj mendoj ni aldonas premion /donacon/.

## PORVIA PROPAGANDO NI PRUNTAS:

Ekspozicion pri internacia klas-kaj pacbatalo,konsistantan el grandaj bildafiŝoj el ĉiuj landoj k.a.materialo akirita pere de Esperanto,kontraŭ pago de 300.-Kčs kaj pago de transportkosto al postsekvanta urbo aŭ reen al Plzen.
Ni povas pruntesendi tre imponan lumbild-paroladon pri Ĉinio kaj la bakteria milito en Koreio, pri Japanio kaj la sanga 1.majo en Tokio, pri la pacbatalo en Japanio kaj nia solidarechelpo al enkarcerigitaj japanaj gekamaradoj, Pri Ĉinio kaj la packonferenco de aziaj kaj pacifikaj regionoj okazinta en Peking.
Ĉiu parolado daŭras proksimume po 2 horoj,konsistas el originalaj fotoj ricevitaj de niaj eksterlandaj kunlaborantoj kostas 300.-Kčs kun la transportkostoj.Atentigo: Por la projektado de la fotoj necesas havi lumbildaparaton,kiu nomas„EPIDIASKOP".

## NI PREPARAS

por ankoraŭ plibona propagando de Esperanto interesan lumbild-paroladon pri la eksplodo de la atombombo en Hiroshima kaj Nagasaki kaj ĝiaj efikoj je la loĝantaro.Estas malpermesata eksporti pri tiuj okazintaĵoj filmon el Japanio al eksterlando,sed nia parolado kun la originalaj fotoj farigos ankaŭ bona trafa propagandilo kontraŭ militoj.Ĉion eblas mendi kaj pagi ĉe k-do.R.Burda, Palackého.nám.č.6, P L Z E Ň. Al eksterlando ni eblas tion sendi.

## -PACBATALANTINO-

Kvazaŭ hodiaŭ, spegulas antaŭ miaj okuloj la junia tago, kiam ni kiel infanoj ludis kaj petolis sur la vilaga placo en Bolino. Subite nin ektimigis neordinara tumulto. Ĉirkaŭ jus pendigita granda afiŝo sur nigrumita pordego en mezo de la vilago kunkuras ĉiuajn vilaganoj. Fine ni rimarkis, ke ili farigis ektimigintaj kaj malgajaj. -Venis al ni malgoja tempo. -

Jen rememoroj de kamaradino Marie Procházková, nuna maŝinarangistino en Vlaším, je la momento, kiam unuafoje en ŝia vivo eksonis la terura vorto - milito. La komenco de la unua mondmilito atingis ŝin apenaŭ 6 jaran en mezo de malriĉa vilago de Vlašíma regiono ĉirkaŭata de montoj kaj arbaroj, kaj ŝangis ŝian negajan infanecon en ĉenon da suferoj kaj mizero.

Jam tiam ŝi rimarkis, kiel la milito forŝtelis al la vilago la ridon. La someraj vesperoj silentigis en la vilago kaj rapide, sinsekve, foriradis la junaj viroj eĉ familiprizorgantoj por neniam plua reveno de multaj.

Foriris eĉ ŝia paĉjo. La plejjuna el la ses gefratoj jus atingis la unuan jaron. Al la malsana patrino la pliagaj infanoj devis helpi pri -zorgi la nutrajon. Dum la rikolto ili devis kolekti nokte sur grandbienula kampo grenspikojn por povi post la frakasado de la grajno baki kukojn. Anstataŭ la infanludoj ekkomencis pilgrimado por panakiro. Tiam ŝi ankoraŭ ne komprenis kial okazas militoj. Sed pliposte ŝi interkonatigis kun tiuj, por kiuj la milito signifas fonton de grandegaj profitoj, kun tiuj, kiuj la militon bezonas. La fabrikposedantoj decidadis laŭ sia propra volo, kaj la respublikon ili kapablis konduki sole en la brakojn de Hitler kaj al la faŝista okupacio de nia lando.

Eksplodis nova mondmilito, alportinta teruran morton al centmiloj da senkulpaj homoj pere de bombardado kaj en senfinaj nesatigeblaj gasmortigejoj. /Daŭrigo en febr./

# Lenin-

Antaŭ dekdu jaroj ĉesis bati la koro de plejgenia homo, kamarado Vladimir Iljiĉ L E N I N. Ankaŭ ni ĉiuj progresemaj esperantistoj kaj pacamantoj profunde funebras pro la morto de tiu ĉi granda genio. L E N I N - tute ordinara homo - kun simpla vestaĵo kaj laborista ĉapo sur la kapo sukcesis nuligi la grandan kaj po-tencan caran regnon de iama Ruslando, - Lenin, kiu scipovis ekflamigi ne nur la korojn de siaj rusaj kuncivitanoj, sed la korojn de ĉiuj ekspluatitoj kaj subpremitoj de la kapitalista jugo en la mondo, - Lenin, kiu sukcesis efektivigi la teoriojn de Marx kaj Engels sur unu sesono de la terglobo, - Lenin, tiu simpla kaj tamen plejnobla homo en la homaro neniam toleris ke iu diferencigu lin de la aliaj kunbatalantoj, kvankam li elstaris inter ĉiuj kvazaŭ lumturo, li gis la morto restis nur unu el ili. Li ne portis ordenojn, nek diferencigis sin per aliaj ornamaĵoj, sole lia cerbo kaj forta, ne rompebla volo lin diferencigis inter la aliaj kunhomoj. Sian tutan vivon kaj ĉiun minuton Lenin dediĉis al la liberiga batalo de la proletaro kaj por la paco inter la homaro.

Lenin, tiom okupata kaj senlace batalanta homo, tamen trovis momenton por interkonatigi kun la senco de nia lingvo, espriminte sin; ke Esperanto povus farigi la latina lingvo por la proletoj.

L Lenin estas morta - sed lia ideo kaj verkoj neniam mortos. Li daŭre vivas en la cerboj kaj koroj de milionoj kaj milionoj da homoj sur la tuta terglobo, kaj foje venos la de Lenin sopirita tempo, kiam lia ideo efektiviĝos en la tuta mondo. Intertempe ni ĉiuj lernu el liaj verkoj kaj disvastigu lian ideologion por plirapidigi la efektivigon de la tera paradizo. Rud. Burda

# KORESPONDI DEZIRAS:



- korespondi necesas -

Ordinara korespondanonco kostas 10.-Kčs.Por eksterlando 2 resp.kuponojn aû samvaloran esperantaĵon.Pagu rekte al la redakcio per ordinara letero La adreson skribu preslitere.Ĉiu anoncinto nepre 1 foje respondu al ĉiu.

K-do.Č á l e k Otta,Křížkova č.10, PLZEŇ,Ĉeĥoslov./neesperantisto,sed povas farigi esp-isto/se vi sendos al li alumetvignetojn,kiujnli rekompencos aû per eks ĉeĥoslovakaj p. markoj,aû alumetvignetoj.
K-do.Z m e š k a l Alois,Celetná 2 PRAHA I,Ĉeĥoslov./36 jara/kun svedaj gek-doj.per let.kaj il.p.k.Nc inter ŝangas p.m.Respondas certe.
K-do.Gerd G i l b r i c h t,Lohmeer Str.12a,PIRNA-COPITZ,DDR.Germanio, 15 jarulo,pri ĉio kun ĉiuj landoj.
K-do.Bernd G ö s s e l /14 jara/ Haûptplatz 3,PIRNA-COPITZ,Germanio, DDR.Pri ĉio kun ĉiuj landoj.
K-do.Klaus G r o s s e /14 jara/ Rudolf Renner Str.17,PIRNA-COPITZ, Germanio,DDR,Pri ĉio k.ĉ.l.
K-do.Uli K r e u s s l e r/13 jara/ Legler Str.1,PIRNA-COPITZ,Germanio, DDR.Pri ĉio kun ĉiuj landoj.
K-do.Ulrich K u t s c h e /15 jara/ Lohmoner Str.5,PIRNA-Copitz, DDR. Germanio.Pri ĉio kun ĉiuj landoj.
K-do.Dieter W a z k y,/16 jarulo/ L.Richter Str.46,PIRNA-Germanio, DDR.Pri ĉio kun ĉiuj landoj.
K-do.Winfried W ö h n e r,/16 jara/ GROSRöHRSDORF Nr.9,Kreis PIRNA,DDR, Germanio,pri ĉio kun ĉiuj landoj.
K-do.Farkas Mihály/23 jara instruisto/ Tanár,Ormospuszta All.ált.isk. BORSOD,m.,Hungario,kun samagaj kaj junaj gek-doj,kun studentoj de pedagogia fako pri lingvistiko,literaturo,filmo,teatro,popoldanco,interŝangas kantojn ktp.Koresp.en rusa germana,angla,franca kaj esperanta lingvo.
K-do.Bohuslav N o v o t n ý,Hlušovice č.48 u Olomouce,pp.BOHUŇOVICE, Ĉeĥoslovakio,per let.kaj il.p.k.pri ĉiuj temoj kun ĉiuj landoj,eĉ kun ĉeĥosl.gek-doj.Ĉiam tuj respondos.
K-do.Gerd S c h ö n f e l d e r/17 jara/KöHEWITZ Nr. 3,über Heidenau Kreis PIRNA,DDR.Germanio,pri ĉio kun ĉiuj landoj.
K-do.Rudolf M ü l l e r /50 jara/ Kesseldorfer Str.55,DRESDEN A28, Germanio,DDR,kun tramistoj.
K-do.Giso B r o s c h e /15 jara/ Postweg 87,PIRNA,DDR.Germanio,pri ĉio kun ĉiuj landoj.
K-do.Helmuth B u l l e, /15 jara/ Gartenstrasse 3,PIRNA,DDR.Germanio pri ĉio kun ĉiuj landoj.
K-do.Klaus H ä n t z s c h e l /15 jara/Birkwitzer Str.12,PIRNA,DDR. Germanio,pri ĉio kun ĉiuj landoj.
K-do.Marcel D u m o n t,Impasse du telegraphe,ACHÈRES,Seine et Oise, Francio,koresp.kaj interŝangas p.m. precipe ĉeĥoslovakajn el jaro 45-52.
K-do.Zdeněk H r š e l,Na Špici 103, HRADEC KRÁLOVÉ II.Ĉeĥoslovakio, interŝangas kaj aĉetas malnovajn Espgazetojn,broŝurojn kaj librojn kun eksterl.gek-doj.Li tre deziras aĉeti la unuajn tri n-ojn.de la 1.vol. de EPĈ.aû rekompencos per io alia.
K-dino.Anna Š e d á,poŝtoficistino, Poštovní úřad RYCHNOV n/Kněžnou,Ĉeĥoslovakio,kun gek-doj el ĉ.landoj.
K-do.Vlastimil A n t o š,Bašty č.4, BRNO,Ĉeĥoslovakio,ĉefe kun gek-doj. el popoldemokratiaj landoj.
K-do.Arthur D e n n o x,25 Kemp Str. ABERDEEN,Skotlando,Britanio,peras kiel sekretario de komunista junularo korespondadon kun ĉeĥoslovakaj kaj alilandaj junularorganizoj.

Grupo de Esperanto-infanoj/10-15j./ dezirass koresp.per let.kaj il.p.k. interŝ.p.m.desegnaĵojn,bildlibrojn ktp. Ĉiu ricevos certe respondon k. ĉiuj sendaĵoj estos rekompensotaj. Adreso:Rud.Burda,Palackého nám.č.6, P L Z E Ň - Ĉeĥoslov.

Eldonas : OSVĚTOVÁ BESEDA - Kroužek esperantistů v P L Z N I-Solní 17.
Redakcio : K-do.Rudolf B U R D A,Palackého nám.č.6, P L Z E Ň
Ĉ E Ĥ O S L O V A K I O